

STIFARIO

192

El la enhavo:

Magia jaro 2000
Marie Bartovská
Stanislava Chrdlová
Adolf Staňura
Jarkonferenco de FS
Nova Esperanto-strato
Libroservo de ĈEA
Informoj pri Telavivo



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Forpasis Stáňa Chrdlová
(1.10. 1954-28.1.2000)
ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare.
Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

rete: starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto

ĈEA: cea@tnet.cz, www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotoj: A 200 Kč, B 100 Kč, D
50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč
(Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj,
enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 490 Kč komencantoj,
450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,
152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta,
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-
na, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de
esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa,
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00
Brno, tel. 05/4323 3047

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

Komitatano: Petr Chrdle, Anglická 878, 252
29 Dobříchovice, tel. 02.9912201, fakso
02.9912126

Komitatano: Lucie Karešová, Tylova 1262,
508 01 Hořice v Podkrkonoší

Komitatano: Květa Krajičková, Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Komitatano: Jindřich Ondraček, Bubenská 17,
170 00 Praha

Komitatano: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11
Netolice

Kontrolgrupo de ĈEA: Vlastimil Kočvara,
Ant. Sovy 10, 747 05 Opava, tel: 0653/611

823, Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09
Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61
Bludov

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová,
Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel.
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724
0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

Lingva kontrolo: Miloslav Pastrňák
(pri nekorektitaj eraroj, precipe en lastminute
almetitaj tekstoj, respondecas la redaktoro)

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A.
Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332
278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské
muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Variabilní symboly pro platby ČES

311	expedice, úhrada koupených knih
604.2	písemné kurzy
604.3	předplatné Starto
668	dary svazu
694	členské příspěvky ČES
694.1	členské příspěvky UEA
789.1	sekce mládeže
789.10	sekce šachistů
789.11	sekce sběratelů
789.13	Sciencia revuo
789.15	ediční fond
789.17	sekce nevidomých
789.3	sekce železničářů
789.7	sekce pedagogů
789.71	ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)
80500	Ediční fond Anny Milatové

Variabilní symbol uvádějte na přední straně
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK
PŘÍBRAM apod. Zároveň uveďte i variabilní
symbol. Dojde-li platba s označením „ČESKÝ
ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme,
kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako
dary svazu.

ISSN 1212-009X

Vivu "magia" jaro 2000

Jam kelkajn tagojn ni vivas en "magia jaro 2000". Nia asocio alpaŝis al plua etapo de post la 9-a ĈEA-kongreso en oktobro en Tábor. Kion al ni la nova jaro alportos, estas certe nia afero. Kiel ni ĉiuj per niaj fortoj kontribuos al nia movado, tiel nia asocio prosperos. Mi jam menciis la 9-an kongreson. Vi scias, ke estis elektita parte nova komitato (kelkaj jam laboris en la pasinta komitato) kaj estis dum kongreso elektita prezidantino.

Mi volas konigi al vi, kiel estis dividitaj unuopaj taskoj de ceteraj komitatoj.

Chrdle Petr - vicprezidanto - eldonado, Libroservo, rilatoj kun UEA.

Řepa Jan - vicprezidanto - kunlaboro kun sekcioj.

Krajičková Květa - sekretario - registrado de membroj, poŝto, internaj rilatoj, organizaj aferoj ktp.

Ondráček Jinřich - kasisto - konferencoj, kongresoj ktp.

Heiser Zdeněk - komitatano - kultur-propaganda aktiveco, kunlaboro kun kluboj.

Karešová Lucie - komitanino - personaraj aferoj, kunvenaj protokoloj, rilatoj kun Eŭropa Esp. Unio (EEU), junulara kaj infana sekcioj.

Kompreneble tio estas nur la ĉefaj agadoj. Ĉiu komitatano estas preparita labori kaj helpi ĉie, kie estas necese.

La nova komitato komencis labori tuj post la kongreso. La unua kunveno okazis jam en novembro, kie estis dividitaj unuopaj taskoj, dua kunveno

realiĝis en januaro. La komitatoj pritraktis aktivigon de asociaj sekcioj, komisionoj kaj Esperanto-kluboj kaj aktualigon de asociaj dokumentoj por plenumi la rezolucion de la 9-a kongreso. Granda atento estis dediĉita al preparo de la 7-a konferenco de ĈEA, kiu okazos kiel kutime aŭtune, verŝajne en Znojmo, ĉar de la tiea EK venis tre akceptebla propono.

Ni petas ĉiujn klubojn, ke ili aranĝu jarkunvenojn kaj sendu raportojn pri sia agado, pri organizado de diversaj Esp. aranĝoj.

La komitato dankas al ĉiuj, kiuj sendis bondezirojn okaze de la nova jaro 2000, kaj dankas al ĉiuj por la ĝisnuna laboro kaj deziras okaze de nova jaro feliĉon, kontenton, firman sanon kaj multajn fortojn por Esperanta laboro.

Věra Podhradská



El la kunveno de la Komitato

La Komitato kunvenis

- 21.1.2000 en Prago kaj traktis pri:
- asocia konferenco oktobre en Znojmo
 - KAEST, Praha 10-12.11.2000
 - translokigo de Libroservo kaj serĉado de nova ĉambro
 - aktualigo de la ĝisnunaj asociaj instrukcioj, precipe organizaj regularoj de sekcioj kaj informoj pri kluboj
 - fondo de sekcioj pri informadiko kaj pri artaj branĉoj
 - danko al AEH por donacitaj publikaĵoj
 - membreco de ĈEA en Komisiono de UEA por la meza Eŭropo

Podpora sekcím a klubům / kroužkům ČES

Forma: granty z finančních prostředků ČES ve výši max. 10.000,-Kč pro rok 2000

Úvod

Výbor ČES považuje sekce a kluby / kroužky za pilíře esperantského hnutí v naší republice a chce podpořit jejich činnost. Je si vědom toho, že jejich aktivity a projekty jsou zaměřeny nejen na aktivní esperantisty, ale i na zvýšení veřejné informovanosti o esperantu a jeho uplatnění, esp. hnutí atd.

Výbor ČES se rozhodl udělit granty na zajímavé akce, projekty apod. sekcím a klubům / kroužkům ČES. Pro rok 2000 se jedná o celkovou částku 10.000,- Kč, v dalších letech podle finančních možností ČES.

Nejedná se o velkou sumu, pokud uvážíme, že bude rozdělena mezi několik projektů, ale věříme, že bude injekcí pro pořadatele i účastníky a motivací k další činnosti.

S tímto nápadem přišel výbor ČES na počátku roku 2000, a proto je možné podat žádost pro akce roku 2000 i se zpětnou platností (t.j. v daném termínu lze požádat o peníze i na právě probíhající akci či již na ukončenou).

Žádost je možno podat do 30.6.2000 na adresu ČES.

Podmínky pro žádost o grant:

- zřizovatelem sekcí a klubů je ČES
- žadatel vypracoval Zprávu o činnosti sekce / klubu v r. 1999 a zaslal ji na ČES
- žadatel se zavazuje do 2 měsíců po ukončení akce zpracovat zprávu z akce / projektu a přiložit vyúčtování finanční částky poskytnuté ČES
- žadatel usiluje o (mediální) ohlas akce / projektu (městské zastupitelstvo, noviny, rozhlas, internet, výstavka, . . .) a přiloží o

tom zprávu

- pokud se akce / projekt neuskuteční, pořadatel je povinen finanční částku vrátit v plné výši

• Obsah přihlášky

Žádost o grant z finančních prostředků ČES na rok 2000

Organizátor: sekce - klub

Odpovědná osoba: jméno - adresa - telefon
- postavení v sekci / klubu (člen, předseda...)

Název akce:

Místo a datum:

Cíl akce:

Stručně program:

Předpokládaná účast:

Rozpočet:

Forma propagace:

Žádost o částku: ____Kč na: _____

Způsob převodu finanční částky:

Rozsah žádosti: max. dvě strany A4, popř. přiložit přihlášku

Výbor ČES si vyhrazuje právo:

- rozhonout o udělení / neudělení grantu a jeho výši
- poskytnout schválenou částku cca měsíc před akcí, tento rok však i se zpětnou platností
- kontrolovat správnost využití financí (popř. celkové vyúčtování akce)
- získat poskytnutou částku zpět, pokud nebyly finanční prostředky vynaloženy v souladu s dohodou

Procedura:

- stanovení zodpovědné osoby za tuto oblast - z výboru ČES
- informování o grantu (Starto)

Výbor ČES

Marie Bartovská

Meze de decembro venis informo, ke 8.12.1999 en hospitalo de Frýdek-Místek mortis elstara funkciulino de nia movado Marie Bartovská, honora membrino de ĈEA kaj UEA, en aĝo de 87 jaroj. Cerba apopleksio kaŭzis ŝian neatenditan forpason. (Se iu povus prunti ŝian foton, ni publikigos ĝin venontfoje). Pri ŝiaj meritoj skribis al nia asocia prezidantino Věra Podhradská la prezidanto de UEA:

Estimata ĈEA Prezidantino,

Kun granda malĝojo mi ricevis la novaĵon pri la forpaso de samideanino Marie Bartovská. Bonvolu akcepti miajn kondolencojn kaj profundan kunsenton. La forpaso de Marie Bartovská estas granda perdo por Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ankaŭ por la tuta Esperanto-movado, ne nur en via lando. Universala Esperanto-Asocio dividas kun vi la malĝojon, ĉar la forpasinto estis kaj honora membro de ĈEA kaj de UEA.

Estas mia kompreno, ke S-ino Bartovská volis iĝi instruisto, sed pro miopeco la lernejo rifuzis ŝin. Ŝi ek-laboris en tolaĵfabriko, sed poste ŝi sukcesis eniri komercan lernejon. Esperanton ŝi lernis en la 30-aj jaroj. Ŝi aktivis en kluboj de pluraj lokoj, ĝis ŝi en 1951 fondis klubon en Frýdek-Místek, kiun ŝi motoris. Ŝi multe instruis kaj en 1965 iniciatis ĉiumonatan "Kafejo Esperanta", kiun ŝi gvidis.

Laborinte en teksaj-fabriko ŝi spertigis pri tiufaka terminologio kaj kontribuis i.a. al PIV. Ŝi estis bonege konata aktivulino en Ĉeĥio, longtempa delegito de UEA kaj honora membro de ĈEA. Ŝi ne okupis centran movadan postenon, sed estis modelo de tutviva sindediĉo al la lingvo Esperanto, kiu fariĝis Universitato de ŝia vivo.

Malmultaj dediĉis sin tiel entuziasme al la afero de la Internacia lingvo kiel Marie Bartovská.

Malgraŭ sia handikapeco pro malforta vidkapablo kaj en lasta periodo de sia vivo ankaŭ per komplika moviĝeblo, ŝi restis ĝis la fino plena de energio kaj persisto kaj mobilizis siajn spiritaĵojn kaj fizikajn fortojn al nia afero; ĉu en la sfero de faka terminologio, ĉu dum preparo de PIV, ĉu kiel diligenta tradukistino el la Ĉeĥa Esperanten, ĉu en aktivigo de lokaj esperantistoj.

Memoro pri ŝi kuraĝigu kaj inspiru nin daŭrigi la agadon por la idealoj, kiuj estis tiel karaj al ŝi.

La Universala Esperanto-Asocio, UEA, salutas, kaj dankeme kaj admire adiaŭas ŝin.

Sincere,

*Kep Enderby,
Prezidanto de UEA*

Ni povas nur aldoni, ke ŝia nomo kiel kunlaborantino pri teksaferoj aperas ne nur en PIV, sed ankaŭ en Esperanta Bildvortaro (1989) de R. Eichholz. Konserviĝis minimume tri ŝiaj fakaj prelegoj: *Nomoj de Ŝtofoj* (AEST'81 Žilina, p. 38-45), *Teksumo kaj Esperanto* (La Stato kaj Estonteco de

Esperanto 1995, p. 125-127) kaj *Brodoj* (KAEST'98, p. 125-131).

Tamen ŝi postlasis ankaŭ plurajn beletrajn tradukojn, nome: *Danjo* (K. Ĉapek), *Malliberulo de la Prezidento* (V. Ŝkutina), *Problemoj en Panonio* (A. Gregor), *Nigraj Baronoj* (M. Ŝvandrlík) kaj enĉehigis la romanon de T. Sekelj *Kumenaŭa*.

Eble ni povus prezenti fragmenton el la plej tenera el la libroj.

Karel Ĉapek

DANJO

Kiam tio naskiĝis, ĝi estis nur blanka nenio, en mano oni tion povis kaŝi; sed, ĉar tio havis duon da nigraj oreletoj kaj malantaŭe vosteton, ni konfesis, ke tio estas hundo, kaj, ĉar ni sopiris havi hundan knabneton, ni donis al tio la nomon Danjo.

Dum ĝi estis blanka nenio, ĝi estis blinda, sen okuloj, kaj koncerne piedetojn, nu, ĝi havis du parojn da io, kion oni kun bona volo povis nomi piedetoj. Sed ĉar la bona volo estis, estis ankaŭ piedetoj, kvankam ili ankoraŭ multon ne valoris; ne parolu, stari sur ili ne eblis, tiom ili estis falemaj kaj malfortaj, kaj la irado, karuleto, tio estis speciala malfacilaĵo. Kiam Danjo streĉis ĉiujn fortojn, ŝi rulis sin dum duontago de la malantaŭa piedo de la panjo al la antaŭa piedo de la panjo, kaj dum la ruliĝado ŝi trifoje satmanĝis kaj dufoje satsodormis. Dormi kaj manĝi ŝi sciis nome tuj post la naskiĝo, tion ŝi ne bezonis lerni; tial ŝi faris tion fervore

dum la tuta dia tago kaj, mi opinias, ankaŭ nokte, kiam neniu rigardis ŝin. Ŝi dormis same konscie kiel dumtage - tia diligenta hundido ŝi estis.

Krome ŝi sciis kriĉi; sed, kiel hundido kriĉas, tion mi pentri ne kapablas kaj prezenti tion al vi mi ankaŭ ne povus, ĉar por tio mi ne havas sufiĉe altan voĉon. Ankaŭ ŝmaci sciis Danjo de naskiĝo, kiam ŝi suĉis la lakteton de la panjo, sed nenion plu; kiel vi vidas, multe paroli kun ŝi komence ne eblis, sed al ŝia panjo (ŝia nomo estas Irisa kaj ŝi estas dikhara vulp-terierino) tio sufiĉis: dum la tuta tago ŝi havis sufiĉe da temo por kun sia bebeto Danjo babili kaj flustri, ŝi flaris ŝin, kisis kaj iekis, purigadis kaj per langeto lavis, kombis kaj karesis, flegis ŝin, nutris ŝin, amtuŝadis ŝin, gardis ŝin, sian propran vilan korpeton sternadis por ŝi kiel kusenon kaj tie, ho, Danjo povis dormi komfortege! Sciu, tion oni nomas amo patrina kaj ĉe la homaj panjoj estas same, vi ja scias. Sed la homaj panjoj bone scias, kion kaj kial ili faras; sed la hunda panjo tion ne scias, nur sentas, ke la naturo tion ordonas al ŝi. „Halo, hundaj sinjorinetoj,“ ordonas la voĉo de la naturo, „atentu, dum via etulo estas blinda kaj sentaŭga, dum ĝi ne kapablas mem defendi sin, ja eĉ ne sin kaŝi aŭ voki helpon, vi ne rajtas de tio eĉ formoviĝi, tion mi diras al vi; vi devas gardi, per propra korpo ĝin ŝirmi kaj, se proksimiĝus iu suspektinda, do hrrr kontraŭ lin kaj mordmurdu lin!“

Irisa ĉion tion komprenis terure serioze kaj, kiam alproksimiĝis suspektinda advokato, ŝi kuris por lin

mordmurdi kaj disŝiris lian pantalon-tubon. Kaj, kiam alproksimiĝis verkisto (estis Josef Kopta), ŝi volis lin ankaŭ mordmurdi kaj ekmordis lian kruron, kaj al iu virino ŝi disŝiris tutan robon, ja ŝi atakadis eĉ oficialajn personojn, kiel leterportiston, fatrasiston, elektro-ripariston kaj la sinjoron de gaso. Krome ŝi minacis multajn personojn publike agantajn, boj-grumblegis kontraŭ deputito, ian miskomprenon ŝi havis eĉ kun policisto kaj dank' al sia atentemo kaj batalemo ŝi ŝirmis sian ununaskiton kontraŭ ĉiuj intrigoj de malamikoj kaj kontraŭ la malico de la mondo. Tia hunda panjo, bubsinjoroj, ne havas facilan vivon; homoj estas multaj kaj ĉiujn ŝi mordi ne povas.

En tiu tago, kiam Danjo festis la dektagan jubileon de sia vivo, renkontis ŝin la unua granda evento: kiam ŝi matene vekigis, ŝi konstatis kun mirego, ke ŝi vidas - provizore nur per unu okulo, sed eĉ unu okulo estas, tiel dirite, granda paŝo en la mondon. Ŝi estis per tio tiom surprizita, ke ŝi ekkriĉis, kaj tiu ĉi memorinda ekkriĉo signifis komencon de la hunda lingvo, kiun oni nomas bojado. Nun Danjo scias jam ne nur paroli, sed eĉ insulti kaj terurigadi; sed tiam ŝi nur ekkriĉetis, kvazaŭ tranĉilo glitus sur telero.

Ĉefa tamen estis tiu nova okulo; ĝis tiam devis Danjo serĉi nur per nazeto, kie havas panjo la bonajn butonojn, el kiuj fluas la lakteto; kiam ŝi provis rampi, ŝi devis antaŭ si ŝovi sian nigran kaj rebrilan nazon por palpi, kio estas antaŭ ŝi. Ja, homoj, tia okulo, kvankam nur unu, estas eminenta inventaĵo: oni

nur ekpalpebrumas kaj tuj scias, halt'!, jen estas muro, jen ia abismo kaj tio blanka estas la panjo. Kaj se oni volas dormi, la okuleto fermas sin kaj - bonan nokton, amu min! Ĉu ni ree vekigu? Malfermiĝas unu okulo kaj miru, malfermiĝas eĉ la dua, iomete misvidas kaj fine klariĝas tuta; kaj Danjo de tiu momento rigardas la mondon per du okuloj kaj dormas per du okuloj, do ŝi ne plu bezonas dormi tiom longe kaj povas pli multe da tempo dediĉi al tio, ke ŝi lernu sidi kaj iradi kaj plurajn aliajn aferojn por la vivo utilajn. Ja, tio estas progreso.

Ĉar en tiu momento eksonis ree la voĉo de la naturo kaj ordonis: „Vi, Danjo, kiam vi jam havas la rigardilojn, rigardu antaŭ vin kaj provu iri.“ Danjo do ekmovis la oreleton, ke ŝi aŭdas kaj komprenas, kaj provis iri. Unue ŝi elŝovis la dekstran antaŭan piedeton kaj kion nun? „Nun metu antaŭen la maldekstran malantaŭan,“ sufloris la voĉo de la naturo. Hura, sukcesis. „Kaj nun la duan malantaŭan,“ konsilis la voĉo de la naturo, „la malantaŭan, diras mi, la malantaŭan, ne la antaŭan! Vi malsaĝa Danjo, vi ja lasis ankoraŭ unu piedeton malantaŭe! Atendu, vi ne povas iri antaŭen, se vi ĝin ne altiros; mi diras, la dekstran malantaŭan vi ŝovu sub vian postajeton! Ne, tio ne estas piedeto, tio estas vosteto, per la vosteto ne eblas iri. Tion memoru, Danjo, pri vosteto vi ne bezonas zorgi, tiu iras mem post la piedetoj. Do, ĉu vi havas ĉiujn piedetojn ĉe si? Nun iom ripozu kaj ree denove: unu - du - tri - kvar, la kapon supren, unu - du - tri - kvar.“

Forpasis Stanjo

Stanislava Chrdlová, en Esperantujo konata kiel Stanjo, naskiĝis 1. 10. 1954 kaj esperantiĝis en 1969, sukcesis en la ekzameno de ĈEA pri kapablo instrui en 1972. Finstudinto de la universitato en Olomouc, fako pedagogio. Ŝi instruis E-on precipe en la formo de mallongaj intensivaj kursoj ne nur en Ĉeĥio, sed per Ĉe-metodo ankaŭ eksterlande, inter alie en San Marino kaj ankaŭ neregule en Koreio (post sia tuttaga instruado de la ĉeĥa lingvo al universitataj studentoj).

Kunverkinto de la *Baza Ĉeĥa Konversacio* (konversacia parto, dum M. Malovec verkis gramatikajojn kaj ĉapitron pri la prononco) kaj de lernolibro de Esperanto por Ĉeĥoj *Esperantem za tři měsíce* (ankaŭ en ĝi ŝi verkis la konversaciajn partojn).

El la E-agado de Stanjo ni menciuj almenaŭ: prelegojn en Esperanto ĉe AIS (en San Marino) pri sia fako pedagogio, dum UK en Prago ŝi gvidis la kurson de la ĉeĥa eksprese, prelegis pri Prago kaj memstare preparis la nacian folkloran vesperon. En 1999, jam sciante pri sia sorto kaj malesperiga prognozo, ŝi prelegis pri Historio de kuracado en okcidentbohemiaj banlokoj dum la SAT-kongreso en Karlovy Vary kaj vigle partoprenis la organizajn laborojn de SAT-kongreso kaj ILEI-konferenco.

Sendube tiuj, kiuj aŭdis ŝiajn prezentaĵojn de ĉeĥa kaj moravia naciaj folkloroj (kantojn kaj dancojn) kaj admiris ŝin en moravia nacia kostumo, apenaŭ forgesos tiun travivaĵon. Entuziasme ŝi

ĉiĉeronis tra Prago kaj la tuta Ĉeĥio.

Ŝi apartenis al viglaj aktivuloj de la Ĉeĥa E-movado kaj ekde la jaro 1995 ŝi plenumis taskon de ĉefdelegito de UEA kaj UK-peranto por Ĉeĥio.

Sian heroan sed vanan batalon kontraŭ kruela malsano Stanjo malvenkis la 28-an de januaro 2000.

La lasta adiaŭo kun Stanjo okazis en la preĝejo de Sankta Nikolao sur la angulo de Malnovurba placo kaj Pariza strato en Prago la 11-an de februaro 2000 je 11-a horo.

Ŝi senteble mankos ne nur al la familio, sed ankaŭ en Esperantujo. Ni petas ĉiujn, kiuj konis ŝin, ke ili dediĉu al memoro de Stanjo momenton da trankvilaj rememoroj.

Por eventualaj kondolencesprimoj ni antaŭdankas kaj petas pardonon, ke ni ne respondos ilin aparte.

Věra Podhradská,
prezidantino de ĈEA
kaj Petro Chrdle, edzo.

Estimata Prezidantino,

Mi ricevis la novaĵon pri la forpaso de Stanjo kun granda malĝojo.

Mi persone konas ŝin ne nur kiel lojala kaj amata kaj amanta edzino de mia amiko kaj kolego Petro, sed ankaŭ kiel longtempa batalanto por Esperanto.

Ŝia forpaso estas granda perdo por ni ĉiuj. Nome de UEA kaj ĉiuj miaj estraranaj kolegoj kaj la oficistoj en la Centra Oficejo, bonvolu akcepti niajn sincerajn kondolenc-esprimojn.

Sincere salutas

*Kep Enderby
Prezidanto de UEA*

Kompleta funebra parolado, kiun prezentis Renato Corsetti, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (interpretis Jindřich Ondráček):

Estimataj gesinjoroj, kara Petro, karaj familianoj, estas por mi granda honoro havi la taskon diri kelkajn adiaŭajn vortojn al Stanislava Chrdlová, inter esperantistoj pli simple kaj pli kare konata kiel Stanjo.

Ne estas facile paroli pri esperantistino kiel Stanjo, ĉar ŝi apartenis al tiu speco de esperantistoj, kiuj laboras por nia komuna idealo trankvile kaj memfide, sen bezono ke oni daŭre agnosku iliajn laborojn kaj parolu pri iliaj meritoj. Tio evidente fontis el ŝia interna certeco pri tio, kion ŝi faris, kaj el interna certeco pri la valoro de la idealo, al kiu ŝi servis.

Foje la konata angla verkistino, Marjorie Boulton diris, ke ŝi ne komprenas kial oni daŭre laŭdas ŝin pro ŝiaj poemoj, kaj ne pro la tre pli peza kaj temporaba laboro, kiun ŝi dediĉas al la Esperanto-klubo de Oksfordo. Evidente Marjorie Boulton opinias, ke ĉiuspeca laboro por Esperanto estas same merita, kaj ke, finfine, la plej pezaj instruaj kaj administraj laboroj meritas pli da rekono ol ili kutime ricevas.

Stanjo efektive estis kolono de la movado, kiam temas pri ĉi tiuj plej fundamentaj laboroj, kaj mi diru nun kelkajn vortojn pri ŝia esperantista kariero. Ŝi naskiĝis la 1-an de oktobro 1954-a kaj esperantiĝis en 1969-a, kiam ŝi estis nur 15-jara. La juna Stanjo estis tre diligenta lernantino kaj nur post 3 jaroj, en 1972-a, ŝi sukcesis en la ekzameno de

Ĉeĥa Esperanto-Asocio pri kapablo instrui. Intertempe ŝi daŭrigis siajn studojn en la universitato en Olomouc, en la fako pri pedagogio. Estante pedagogino, ŝi nature interesiĝis tuj pri instruado de Esperanto precipe en la formo de mallongaj intensivaj kursoj kaj ne nur en Ĉeĥujo. Ĉar ŝi havis mirindajn komunikajn kapablojn, ŝi lernis kiel instrui per la rekta metodo, kiun ni konas kiel Ĉe-metodon, kaj tiun metodon ŝi aplikis ankaŭ eksterlande, kie ne estis komuna komunika lingvo kun la studentoj, interalie en Sanmarino kaj ankaŭ en Koreujo. En Seulo tio estis nur dua instrua tasko post la ĉefa tuttaga instruado de la ĉeĥa lingvo al koreaj universitataj studentoj. Ŝi ankaŭ aktivis en la verkado de lerniloj. Ŝi kunverkis la bazan ĉeĥan konversacio- kaj lerno-libron de Esperanto por ĉeĥoj, Esperantem za tři měsíce. En ambaŭ ŝi mem verkis la konversaciajn partojn.

Estas tro malfacile rakonti ĉion, kion ŝi faris en la Esperanto-movado. Ni menciui almenaŭ ŝiajn prelegojn en Esperanto ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj -AIS (Sanmarino) pri sia fako, tio estas pedagogio. Dum la Universala Kongreso en Prago ŝi gvidis la kurson de la ĉeĥa lingvo eksprese, ŝi prelegis pri Prago kaj memstare ŝi pretigis la nacian folkloran vesperon. Krome ŝi kompilis la programon de la oficiala antaŭkongreso en Brno "Moravia folkloro al la mondo". La pasintan jaron, do en 1999-a, jam sciante pri sia sorto kaj pri la malesperiga prognozo pri la malsano ŝi prelegis pri Historio de kuracado en okcidentbohemiaj banlokoj

dum la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Karlovy Vary kaj vigle, en la limoj de sia handikapo pro evoluiginta malsano, ŝi partoprenis la organizajn laborojn de tiu sama kongreso kaj de la konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu same okazis pasint-jare en Ĉeĥujo.

Sed, ŝi ne nur okupiĝis pri internaciaj aferoj. Ŝi ankaŭ apartenis al la plej viglaj agantoj de la ĉeĥa Esperantomovado kaj ekde la jaro 1995-a ŝi plenumis la taskon de ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio kaj peranto de la Universalaj Kongresoj por Ĉeĥujo. En ĉi tiuj funkcioj ŝi lerte sukcesis plenumi grandajn servojn al la ĉeĥaj esperantistoj, kiuj volis starigi aŭ restarigi siajn internaciajn kunligojn. En Universala Esperanto-Asocio la ĉeĥa ĉefdelegito kaj peranto ĉiam estis rigardata kiel modelo por la ceteraj ĉefdelegitoj kaj perantoj, ĉar ŝi ĉiam precize kaj modeste plenumis siajn devojn. Eble ŝi tiel bone plenumis ĉi tiujn siajn taskojn, ĉar ŝi havis grandan amon al sia naskiĝ- kaj loĝ-lando. Kaj tiun landon ŝi klarigis al eksterlandaj esperantistoj laŭ la plej bonaj tradicioj de nia multlanda kaj multkultura movado prelegante pri Ĉeĥujo, pri ĝiaj naciaj kutimoj kaj folkloro, mem prezentante ilin, ĉu en Ĉeĥujo, Francujo, Germanujo, Japanujo aŭ aliloke.

Sendube tiuj, kiuj aŭdis siajn prezentaĵojn de ĉeĥa kaj moravia naciaj folkloroj (kantoj kaj dancoj) kaj admiris ŝin en moravia nacia kostumo, apenaŭ forgesos tiun travivaĵon. Entuziasme ŝi ankaŭ ĉiĉeronis tra Prago kaj la tuta

Ĉeĥujo. Ŝi sukcesis fariĝi plej universala licenciita ĉiĉerono, kio eblas en Ĉeĥujo. Post sukceso en ekzamenoj de profesiaj ĉiĉeronoj por Ĉeĥujo krom Prago ŝi sukcesis ankaŭ por Prago krom la juda kvartalo kaj fine ankaŭ por la juda kvartalo. Ŝian ĉiĉeronan lertecon povis sufiĉe ofte ĝui ankaŭ esperantistoj. Kiom entuziasme ŝi kapablis paroli pri la historio kaj arkitekturo de Malnovurba Placo, kie ni nun adiaŭas ŝin kaj kie ŝi sekve ripozos!

Mi ne volas pli longe paroli pri ŝiaj agoj, sed nur fari iun ĝeneralan komenton pri ŝia esperantista vivo, en ĉi tiu malĝoja momento, kiam ni kunvenis ĉi tie, por adiaŭi ŝin.

Ni adiaŭas ŝin kaj samtempe ni ne adiaŭas ŝin, ĉar tio, kion ŝi faris, restas inter ni.

Fine, mi lastan fojon turnu min al la forpasinta kolegino Stanjo nome de Universala Esperanto-Asocio, sed ankaŭ nome de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de ĉiuj neorganizitaj esperantistoj, kiuj renkontis ŝin kaj profunde ŝin estimis. Adiaŭ Stanjo, estis bone koni vin. Kaj dankon pro via agado!

Karaj samideanoj,

mi volas kore danki almenaŭ pere de Starto (kun peto de kompreno, ke mi ne skribos al vi individue) al ĉiuj, kiuj esprimis al ni siajn kondolencojn pro forpaso de mia kara edzino Stanislava (Stanjo). Precipe mi dankas al vi, kiuj venis persone adiaŭi ŝin la 11-an de februaro - vere de ĉiuj anguloj de nia lando kaj eĉ de Danio, Germanio kaj Italio. Pro la amaso de ĉeestantaj esperantistoj ni estis vere kortuŝitaj.

Nome de la parenkaro Petro Chrdle

JUBILEOJ

91

ŽÁK Jaromír, Brno-Vinohrady

90

ILLEK Alois, Brno 14

85

STAŇURA Adolf, Havířov-Šumbark

VŠOLEK Josef, Liberec 1

80

BÍNOVÁ Marie, Praha 10 - Petrovice

DOLEŽALOVÁ Jaroslava, Žďár n.S.

DONHOFOVÁ Eda, Jablonec n.N.

FIEDLER Vladimír, Hradec Králové 3

HORKÝ Jaroslav, Hynčina

JANY Jiří, Opava

KADLECOVÁ Vlasta, Plzeň-Křimice

MAUDROVÁ Helena, Praha 4

MOUCHA Květoslav, Železný Brod

NEUWIRT Amoš Ing., Nová Ves n.O.

POKORNÝ Jan, Hluboká n.V.

SÁDLO Pravoslav Dr., Praha 6

TYRALA Miroslav, Nový Jičín

URBANCOVÁ Olga, Karlovy Vary

VÍŠKOVÁ Františka, Netvořice

VOTOUPAL Silvestr Ing., Frýdek-Místek

ZAORAL Ludvík Olomouc - Holice 75

70

HOŘEJŠÍ Josef, Rožmitál p.Třem.

KASL Jaroslav Ing., Ostrov n/Ohří

KLIMECKÁ Marie, Brno

SLÁDEČEK Vladimír, Ostrava-Kunčičky

TROJAN Vojtěch, Žacléř

60

HRON Jiří, Pardubice

JONÁŠ Zbyněk Mgr., Klatovy

KINDLOVÁ Františka, Mladá Boleslav

PILS Jan, Praha 4

POLESNÁ Valentína, Milevsko

SMOLOVÁ Ludmila, Jablonec n.N.

VYCHODIL Jiří, Praha 9-Střížkov

WRONOVÁ Alena, Havířov

50

HÁJKOVÁ Marie, Hradec Králové

VYORAL Oldřich Ing., Veselí n.M.

Ludvík Zaoral 80-jarulo

La 17-an de marto 2000 festas sian 80-an naskiĝtagon s-ano Ludvík Zaoral, nelacigebla aktivulo de la Esperantoklubo en Olomouc.

Krom funkcio de vicprezidanto de la klubo li gvidas dum multaj jaroj kursojn por progresintoj kaj modele zorgas pri la kluba biblioteko. Lia oferema laboro por E-o estas instiga ekzemplo por aliaj gesamideanoj.

Vladimír Mohapl



Ni kondolencas:

* Post longa malsano forpasis la 14-an de decembro 1999 s-ano **František Domkář**, multjara kaj meritplena membro de Esperanto-rondeto en Havlíčkův Brod. Li forpasis en la aĝo de 82 jaroj.
(-vm-)

* En Český Těšín forpasis s-ano **Vladimír Štefek** (72j.), membro de EK Havířov.

Adolf STAŬURA 85-jara

Honora membro de nia asocio. Lia ĝusta naskiĝdato estis 10. 3. 1915. Estante 14-jara, li vizitadis kurson de Esperanto en sia naskiĝvilaĝo Radvanice, nun kvartalo de Ostrava. En 1933 estis jam pluraj esperantistoj en tiu loko, ili do fondis klubon Nova vivo. Post unu jaro li finstudis komercan akademion, estis senokupa dum du jaroj, dum 16 monatoj laboris kiel kontisto, ankaŭ ĉe konstruado de fortikajoj, kaj sekvis soldatigo en oktobro 1937. En majo 1938 li aperis en Český Těšín kaj konatiĝis kun germano Ludwig Krysta, prezidanto de *Regiona esperantista ligo*. Krysta verkis propagandan flugfolion en la germana lingvo, ĝi estis Internacia lingvo Esperanto sur unu folio. Staŭura helpis al li ĉe kompilado de la ĉeĥa teksto kaj tiel lia nomo unuafoje aperis en Esperantujo. Pro instalo de la Protektorato Bohemio kaj Moravio en 1939 la Esperantomovado ĉesis funkcii. Post la milito estis la Nova vivo refondita kaj Staŭura fariĝis prezidanto. Radiostacio Ostrava renovigis siajn Esperantajn elsendojn en septembro 1945 kaj post kelkaj monatoj ankaŭ Staŭura partoprenis tion, tradukante, parolante kaj ankaŭ verkante iujn tekstojn. La elsendoj estis ĉesigitaj en 1949. Staŭura skribis por gazetoj en Ostrava informojn pri la movado¹⁾. Intertempe, en 1948, li plenumis „eminente“ ekzamenon pri kapablo instrui Esperanton antaŭ komisiono: PhDr. Stanislav Kamarýt, JUDr. Tomáš Pumpr, PhDr. Augustin Pitlík kaj Ota Ginz. Estante prezidanto de la klubo, li instruis kaj zorgis pri propagando.

Ŝatata afero ĉe Staŭura estis ankaŭ stenografio. Li adaptis la ĉeĥan sistemon Herout-Mikulík al Esperanto kaj tiu konciza teksto estis presita en tiama asocia revuo *Esperantista* kaj eldonita memstare en 1950. Tiam komenciĝis kunlaborado de Staŭura kun Ŝtata stenografia instituto en Praha. Li serĉadis kaj trovadis stenografojn-esperantistojn en aliaj landoj, ricevadis de ili informojn pri la stenografia movado en tiuj landoj kaj ĉeĥigitajn tekstojn sendadis al la instituto, kiu ilin bonvene akceptis kaj publikigis en sia bulteno. En la ĉeĥa libro *Historio de stenografio* fare de prof. Jan Petrásek, eldonita en 1973, oni povas legi: Staŭura gajnadis per Esperanto informojn pri stenografio en aliaj landoj kaj iuj sciigoj pri eksterlandaj sistemoj en tiu ĉi libro estas ĉerpitaj el liaj artikoloj. Kiam la sistemo Herout-Mikulík estis reformita, Staŭura kompilis novan Esperantan version, kiu aperis en bulteno de la instituto *Informoj de la Ŝtata stenografia instituto*, vol. 1966/67. Staŭura kunlaboris kun eldonanto de Esperanta stenografia gazeto *Fluganta skribilo* en Parizo, A. G. Provost, dum la jaroj 1954-61, kaj kun eldonanto de flugfoliforma bulteno *Intersteno*, italo Clemens Daglio, en la sesdekaj jaroj.

En 1959 Staŭura translokiĝis al Ostrava-Poruba kaj tie fariĝis klubestro en 1967. Jaron antaŭe li viziti Universalan kongreson en Budapeŝt. Kulturdomo en Poruba, kie la klubo havis kunvenejon, komencis en 1968 organizi konversaciajn vesperojn, unufoje monate, en lingvoj angla, franca, germana kaj Staŭura proponis ankaŭ la Esperantajn.

Tiuj okazis, ofte kun diapozitivoj kaj estis honorariataj. Post fondiĝo de ĈEA en 1969 li fariĝis ties membro.

Ekde 1970 Staŭra komencis kompili ĉeĥajn krucenigmojn, poste ankaŭ Esperantajn, kiuj estis publikigitaj ne nur en ĉeĥaj kaj slovakaj gazetoj, sed ankaŭ en aliaj landoj. Ekde la jaro 1972 uzadis Staŭra ĉe siaj enigmoj en *Hádanka a křížovka* pseŭdonimon Ant. O. Esper. Poste aperis en tiu gazeto anagramoj el vorto Esperanto: Sapér tone a Seno Petra.

Staŭra ŝatis legi librojn de ĉeĥa verkisto Josef Nesvadba, en kiuj la aŭtoro ofte menciis Esperanton. Staŭra esperantigis 10 novelojn, kvar estis eldonitaj fare de la movado *La juna penso* en Francio sub titolo *La tabuo*, poste ankaŭ ĈEA eldonis libron kun titolo *La perdita vizaĝo* en 5000 ekzempleroj en 1974.

En 1979 estis Staŭra nomumita prezidanto de lingva komisiono, samjare transloĝiĝis al Havířov. Ekde 1983 li komencis laŭ deziro de redaktoro de asocia gazeto Starto verki recenzojn pri esperantaj libroj. En 1986 aperis en Prago broŝuro Abunde kaj redunde, per kiu anoncis sian vivon tiel nomata Praga skolo. Li estis ĝia kontraŭulo kaj en la gazeto Starto interŝanĝadis opiniojn pri la afero. Poste en 1989 li ricevis diplomon de honora membro de UEA. En 1991 li komencis korespondi kun prezidanto de Akademio de Esperanto, d-ro André Albaut, kaj tiu al li proponis, ke li kandidatiĝu por membreco en la Akademio. Tia afero postulas rekomendon de kvin membroj de la institucio.

Staŭra ne estis eksterlande tre konata kaj kun kelkaj akademianoj li havis malfavorajn diskutojn en gazetoj. Tial li sukcesis akiri nur tri rekomendojn, krom tiu de la prezidanto de la Akademio ankaŭ de ties sekretario Jean Thierry kaj itala poeto Aldo de'Giori. Kun tiamaĵ du ĉeĥaj geakademianoj li ne korespondis pri tiu afero, ili ja estis „pragoskolanoj“. En 1997 li formetis sian membrecon ĉe Esperantlingva Verkista Asocio, kies membro li estis ekde ĝia fondiĝo.

Ankoraŭ menciindas lia kunlaborado kun la slovaka Stenografia Instituto en Bratislava fine de la kvindekaj jaroj, kies profesoro kaj iutempa direktoro, d-ro Jozef Mistrík, verkinto de lernolibroj pri stenografio, deziris havi en la libroj artikolon pri Esperanto, kaj Staŭra verkis ĝin, tio estis en la jaroj 1959, 1961, 1963. En la libro Stenografia III. d-ro Mistrík informis pri la adapto de Staŭra-sistemo por Esperanto.

En 1951 Staŭra sendis salutan leteron al la nove fondita Ĉina E-Ligo. Ĝi estis ĉinigitaj kaj aperis en *Popola mondo*, aprilo 1951, unu paragrafo ankaŭ en ĵurnalo *Lumo*, ĉinlingva. Prelego fare de Pablo Neruda pri *Tri kolonoj de hispana literaturo*, prezentita en Praha en 1954, estis japanigita laŭ lia traduko kaj aperis en literatura revuo Ŝin Nihon Bungaku samjare. Iuj liaj esperantaj tekstoj pri aliaj stenografiaj sistemoj estis tradukitaj en naciajn lingvojn, publikigitaj en Parizo, Sofia, Berlino, kaj iuj estis la unuaj informoj, kiuj pri tiuj sistemoj inter stenografioj konatiĝis.

1) Tion li faris ĝis sia 80-a vivojaro.

P.F. 2000

Ať nám ten rok melou hezky
neúplatné mlýny
a dojdeme aspoň pěšky
v poklidný kraj pohostinný

A dny a týdny
všechny roční doby
ať mají vzhled vlídný
bez záluďné zloby

Donkichotské mlýny stále
ve větrném jasu
točí se točí vytrvale
Ať ještě nejsme
na lopatkách času

Čestmír Vidman

Za Josefem Rumlerem

Už se setkává se Zamenhofem
Máchou a Erbenem
v jazykovém sboru učeném

Po Pegasu zprávu s deštěm dává
v zelené cestě za jarem

Pozdravem nám vyfukává
v podkúvek rytmu prastarém

Vy tam nahoře mimo pražských sazí
na společných vlnách porozumění

vždy budem vnímat vaše vzkazy
a řeči dáleč blízka znamení

Čestmír Vidman

P.F. 2000

Al ni tiun jaron muelu bele
la nekorupteblaj mueliloj
kaj ni eniru almenaŭ perpiede
kvietan.pejzaĝon gastaman

Kaj tagoj kaj semajnoj
ĉiuj jarsezonoj
havu aspekton afablan
sen insida kolero

Donkihotaj mueliloj ĉiam
en venta sereneco
sin turnas turnas persiste
Ni ankoraŭ ne estu
sur la aloj de la tempo

Čestmír Vidman

Sekvante Josef Rumler

Jam li renkontiĝas kun Zamenhof
Mácha kaj Erben
en lingva kolegio dokta

Pere de Pegaso sciigon kun pluvo donas
sur verda vojo al la printempo

Saluton al ni elfrapetas
en de hufumetoj ritmo praa

Vi tie supre ekster pragaj fulgoj
sur komunaj ondoj de la interkompreno

ni ĉiam perceptos viajn mesaĝojn
kaj de foraj paroloj proksimajn avizojn

Čestmír Vidman

Pár versů u příležitosti roku 2000

Co Vám Mikuláš přinesl v koši?
Mně trpělivost hroší
Co Vám nadělil čert?
Mně Úsměv Ironii Žert

Štědrý večer

Co bychom chtěli víc?
Máme dobré a věrné přátele
Na světě nejsme sami
Těším se že byl Silvestrovský večer
půjdu slavit - do postele

Jiní si budou připíjet
Whisky Vodku Rum
aniž by myslili na to
že kdesi se zřítíl dům
Jak snadno člověka oželíme
nešťastné a jejich život

Vánoční

Vánoce jsou před námi
pod okny netrpělivě podupává nový rok
Co nám přinese? Radost? Klamy?

Dobrou náladu pod stromeček
chutný plod na každé haluzi
Místo sprostoty jen pár teček
Zdraví bez potíží
za babku zboží na krámě
ať sundáte jako obnošený kabát
vše co Vás bolí a tíží

To Vám přeji manželé Karenovi
k roku 2000

Prosinec 1999

Rimarkigo: En Starto 5-6-1999 ni forgesis skribi, ke la kondolenca poemo pri J. Rumler (p. 8) estas de J. Karen, esperantigo de M. Malovec.

Kelkaj versoj okaze de la jaro 2000

Kion alportis la korbo de Nikolao?
Al mi paciencon de hipopotamo
Kio venis al vi de la diablo?
Al mi Rideto Ironio Ŝerc-afablo

Kristnaska vespero

Kion ni dezirus pli?
Ni havas ne unu fidelan amikon
En la mondo ni ne solas
Mi ĝojas pri Silvestro-tago
kaj iros festi - en la lito

Aliaj tostos
Viskio Vodko Rumo
ne pensante ke ie
teren ruiniĝis domo
Kiel facile ni forĝemas
viktimojn iliajn vivojn

Kristnaska

Kristnasko antaŭ nia pordo
sub fenestroj malpacienas Novjaro
Kion ĝi alportos? Ĝojon? Trompojn?

Bonan humoron sub la arbon
bongustajon sur ĉiu branĉo
Tripunkton anstataŭ fia vorto
Sanon sen komplikajoj
varojn kis-kostajn en butikoj
Demetu kiel foruzitan jakon
dolorojn kaj kor-pezaĵojn

Deziras al vi geedzoj Karen
por la jaro 2000

Decembre 1999

*Jiří Karen
(esperantigo M. Malovec)*

Kristnaska arbo en Vatikano

Vendrede la 4-an de decembro 1999 je la 13,30 horo ekveturis speciala trajno de Ĉeĥaj Fervojoj ĈD, trenata de la lokomotivo 750 289-1 el fervoja stacio Dobrá apud Frýdek-Místek, por ke ĝi post 1700-kilometra veturo tra Aŭstrio kaj Italio alvenu al fervoja stacio San Pietro sur teritorio de Vatikano, kiun ĝi atingis la 7-an de decembro.

La speciala trajno transportis sur du specialaj ŝarĝvagonoj ĈD majestan piceon, 85-jaran, 25 metrojn altan, kun branĉoj je diametro ĝis 8 metroj, elektitan kiel kristnaska arbo, donacitan de ĈR al la papo Johano Paŭlo la 2-a, kune kun 30 malgrandaj kristnaskaj arboj kaj specialaj ornamaĵoj faritaj el pajlo kaj aliaj tradiciaj "popolaj" materialoj, por ornamo dum kristnaska periodo la Placon de Sankta Petro, vaticanajn oficejon kaj loĝejon de la papo.

En speciala trajno transportanta la kristnaskajn arbojn estis krome entrainigitaj du salonvagonoj por honoraj gastoj kaj akompananta perdonalo, unu el salonvagonoj estis tiu historia de la unua ĉeĥoslovaka prezidento T. G. Masaryk, konservita kaj riparita dum lastaj jaroj dank' al aktivado kaj mondonacoj de la fervojistoj kaj iliaj sindikatoj.

Jindřich Tomášek

Jarkonferenco de FS ĈEA

Inter la 5-a kaj 7-a de novembro 1999 okazis jarkonferenco de fervojista sekcio de ĈEA en la sudbohemia urbo Tábor. Inter pli ol kvindek partoprenantoj estis

gastoj el Aŭstrio, Germanio, Hungario, Nederlando kaj Slovakio, ĉeĥan fervojon reprezentis PhDr. Anna Abelovská kaj nian E-asocion doc. Petro Chrdle.

Dum la vendreda posttagmezo prelegis Jindřich Tomášek pri "Fervoja linio Tábor-Bechyně" (konstruita por elektra trakciado en 1903, 8 jarojn pli frue ol la elektrizita linio en Mariazell), aliaj raportoj koncernis septembran kunsidon de komisiono Okcidento-Oriento en Ostrava, sekurec-instalajojn de la ĉeĥa firmao Starmon, Stírian landan trafikajn ekspozicion en la aŭstra Knittelfeld ktp.

Sabata antaŭtagmeza programo estis dediĉita al la labora traktato. Al la sukcesoj en 1999 apartenas Printempa Konferenco en Valtice, partopreno en 51-a IFEF-kongreso en Le Mans, en "Fervojista Tago" dum UK Berlino, instrukcioj en la horaro de ĈD, 7-a numero de Fervojistaj Kajeroj, Suplemento al Historio de IFEF k.a. Estis reelektitaj la komitatoj, altigita kotizo je 200 Kč. La sekcio nun havas 139 membrojn, el kiuj 71 membras en IFEF.

Post la traktado la konferencanoj vidis en Lokomotivdeponejo de Tábor la elektran motorvagonon M 400.001, konstruitan en 1903 de ing. František Křížík. Poste ili traveturis la trakon el Tábor al Bechyně, kie ili vizitis la Fajrobrigadistan Muzeon. Dimanĉe antaŭtagmeze oni rigardis la historian parton de Tábor, kiu espereble en majo 2001 gastigos la 53-an kongreson de IFEF.

Jindřich Tomášek

Esperanto helpis al la venkinto

Klarnetisto Karel Dohnal, 25-jara filo de nia membro el Budišov, partoprenis aŭtune en Oostende (Belgio) festivalon de pli ol mil klarnetistoj el la tuta mondo kaj gajnis la unuan premion. Lian partoprenon ebligis s-ino Flory Witdhoeck, esperantistino, ĉe kiu li loĝis. Pri la venkinto kaj helpo de Esperanto informis lokaj gazetoj.

Franca familio travintras en Ĉeĥio

Laurent Cuenot, Gudule Le Pichon kaj ilia trijara filineto Lola nomadas tra Eŭropo en ruldromo trenata de ĉevalo Camille, akompanataj de hundo Paquetette. Aŭtune ili alvenis el Pollando al Opava kaj tie travintras ĉe amikoj. Estante esperantistoj ili vizitis plurajn klubojn kaj rakontis pri sia vojaĝo prezentante lumbildojn. La knabineto tre rapide lernas lingvon de lando, kiun ili traveturas, tial ŝi nun ĉiujn bonvenigas ĉehlingve. La familio planas vojaĝi tra Hungario, Bulgario, Rumanio, Grekio, Italio, Portugalio, Hispanio kaj reveni en Francion, kiam Lola estos 6-jara kaj devos vizitadi lernejon. Pri ilia restado ĉe esperantistoj nialande informis pluraj ĵurnaloj.

Ĉeĥa-pola kunlaboro profundiĝas

S-ano inĝ. Zdeněk Glajcar el Pola Těšín invitis niajn esperantistojn jam dum novembro Esperanto-Kafejo en Frýdek-Místek, partopreni ilian Kristnaskan kunvenon 22.12.1999. Ni



dubis pri granda partopreno, ĉar du tagojn antaŭ sankta vespero jam ĉiuj homoj plejparte preparas feston aŭ ripozon.

Tamen de ĉeĥa flanko alveturis 6 reprezentantoj kaj ni ĉiuj estis ravitaj. En kluba programo ili prezentis al ni polajn Kristnaskajn kutimojn. Tre plaĉis al ni oblata bondeziro. Ĉiu ricevis grandan oblato kun Kristnaska motivo. Ĉiu devis de oblato de sia najbaro peceton rompi, formangi kaj bondeziri reciproke. Tosto per ĉampana vino, sukeraĵo kun teo kaj kafo elkreis misteran atmosferon. Sub ĝia influo ni interkonsentis, ke poloj organizos ĉiumonate similan kunvenon kun interesa prelego, kie ili atendas reprezentantojn de kluboj el ĉeĥa respubliko.

Do tio estas bona starto por plibonigi ĉeĥan-polan kunlaboron en la jaro 2000.
-drkoč-

Esperanta Silvestro en Ĉeská Třebová

Esperanto-klubo "Amikeco" aranĝis merkrede la 29-an de decembro 1999 tradician Silvestran Vesperon de esperantistoj en Kultura Klubo. La riĉa regala kun kristnaskaj bakajoj kaj bongusta vespermanĝo estis sekvata de dancamuzo laŭ muziko de kvinmembra ensemblo. La paŭzojn oni plenigis per deklamado de kristnaskaj versoj, per moda prezentado "Modo en la venonta jarmilo" kaj konkurso por elekti la plej belajn piedojn. Ĉiu partoprenanto ricevis kristnaskajn donacetojn.
-jt-

LIBROSERVO de ĈEA, nabídka zboží pro rok 2000

Český esperantský svaz LIBROSERVO pošt. příhr. 1069 111 21 Praha 1 cea@tnet.cz	Množstevní slevy: Při odběru zboží nejméně za	poskytujeme slevu
	200,- Kč	10%
	500,- Kč	15%
	1000,- Kč	20%

Výše uvedené slevy poskytujeme klubům i jednotlivcům, **neplatí** však pro prodej do **zahraničí**, ani ve **stáncích** Libroserva během sjezdů, konferencí a ostatních setkání esperantistů. **Ceny** jsou v **Kč** a neplatí pro prodej do zahraničí. Při **zásilkové** službě připočítáváme **poštovné a balné**.

Některé zboží je na skladě jen v omezeném množství, zvláště starší a zahraniční vydání.

V současné době je Libroservo umístěno na více místech i mimo Prahu, proto se předem omlouváme, že při expedici může dojít ke zpožděním.



Motiv z nové publikace KAEST

1. Učebnice a příručky k jazykovým zkouškám

1.01 Kilian: ABC mezinárodního jazyka esperanto	8,-
1.04 Chrdle-Chrdlová: Esperantom za tři měsíce	69,-
1.05 Ćink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé	24,-
1.06 Vondroušek: Historie a spisovatelé	10,-
1.07 Vondroušek: Historio kaj biografioj	10,-
1.08 Malovec: Gramatiko de Esperanto	17,-
1.09 Kilian: La Mondo Rakontas (LMR)	10,-
1.10 Kamaryt: Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio	20,-
NOVINKA:	
1.16 Malovec: Gramatiko de Esperanto (Rozšířené vydání)	130,-

2. Slovníky

2.01 Kilian: 808 nejužívanějších slovních kmenů v esperantu	8,-
2.02 Kilian: Esperantsko-český a česko-esperantský slovníček	10,-
2.03 Hromada: Esperantsko-český a česko-esperantský kapesní slovník	20,-
2.04 Bří Filipové: Velký slovník česko-esperantský	70,-
2.05 Kraft-Malovec: Slovník esperantsko-český	129,-
2.06 Kraft: Slovník česko-esperantský (23566 hesel)	188,-
2.07 Rybář: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj	16,-
2.08 Traxler: Česko-esperantský právnícký slovník	43,-
2.09 Traxler: Esperantsko-český právnícký slovník	49,-

Viz též 6.18 a 6.23!


☆ Starto 1/2000 ☆

3. Povidky, romány a jiná próza

3.01 Čapek: Milito kontraŭ Salamandroj	95,-
3.02 Čapek: La Blanka Malsano	60,-
3.03 Čapek: Antologieto el lia verkaro kun konciza priskribo de lia signifo, biografio kaj bibliografio	5,-
3.04 Kožík: Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj heroa vivo de J.A. Komenský. + El la saĝo de Komenio. + Labirinto de la mondo kaj paradizo de la-koro.	26,-
3.05 Hašek: Ne nur soldato Ŝvejk	126,-
3.07 Echtner: Sep tradukoj	13,-
3.10 Bauer: La fenomeno Svislando	35,-
3.12 Meze de Eŭropo. Skize pri historio de Ĉeĥoslovakio.	10,-
3.13 Rumler: Abunde kaj redunde	4,-
3.17 Havel: Aŭdienco	42,-
3.18 Kafka: Songo kaj aliaj rakontoj	126,-
3.19 Schnitzler: Songonovelo	126,-
3.20 Kurisu Kei: Co mi dala ĉeská literatura	30,-
3.21 Philippe: Badenlanda Legendaro de la Konstanca Lago	126,-
3.22 Foglar: La knaboj de la Kastora Rivero	50,-
3.23 d'Arbaud: La besto de Vakareso	98,-
3.24 Tvarožek: Ŝercoj 1	12,-
3.25 Tvarožek: Ŝercoj 2	12,-

4. Básně, sbirky básní

4.01 Urbanová: El subaj fontoj	16,-
4.02 Urbanová: Peza vino / Těžké víno	39,-
4.03 Karen-Rumler-Urbanová-Vidman: Kvarfolio	4,-
4.05 Kofínek: Elekte el la originalaj kaj tradukitaj poemoj	5,-
4.07 K.H. Mácha (tr. Pumpr): Majo	62,-
4.08 Urban: Nova Ezopo	30,-
4.09 Ludíková: Ekaŭdi la animon / Uslyšet duši	96,-
4.10 Gazda: Frenezetaĵoj	20,-
4.11 K.H. Mácha (tr. Rumler): Majo	62,-



5. Zpěvníky

5.01 Cink: Scieta Kantareto	24,-
5.03 Rømmesmo: Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj	58,-

6. Odborná knihovna

6.01 Kolekto de la referaĵoj el la internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1982", energio - tutmonda problemo	10,-
6.02 Kolekto de la referaĵoj el la internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1989", fervojoj	45,-
6.03 Werner: Terminologia Kurso	20,-
6.04 Tuma: La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo	9,-
6.05 Internacia Seminario pri Komenio, 1992	13,-
6.06 Maxwell-Preotu-Tacu: Lingvo kaj kibernetiko	142,-
6.07 Chrdle (ed.): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo	147,-
6.08 Frank: Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion	92,-
6.09 Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj	38,-
6.10 Zosimi Umeda: Jak úspěšně vyjednávat s Japonci	30,-
6.11 Vogelmann: La Nova Realismo (bindita)	150,-
6.12 Vogelmann: La Nova Realismo (broŝurita)	63,-
6.15 Fössmeier: Ĉifrado kaj ĝia rolo en la "nova komunikado" - Pri objektiveco en la scienco	30,-
6.16 Kavka: Kontribue al PIV	30,-
6.17 KAEST '98 (Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tehniko) - programo	15,-
6.18 Středa: Terminaro de feloj / Názvoslovní kůží	126,-
6.19 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 6	880,-
6.20 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 7	880,-
6.21 Weltner a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 10	880,-
NOVINKA:	
6.22 KAEST '98: Modernaj rimedoj de komunikado - prelegaro	150,-
6.23 Werner: Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana	20,-

7. Mapy

7.01 Poŝatlaso Praha	25,-
----------------------	------

8. Nosiĉe zvukového záznamu

KA = mag. kazeta

CD = komp. disk

8.01 KA: Team en Esperanto	58,-
8.02 KA: Famaj kantoj por belaj horoj	140,-
8.03 KA: Kantoj de l' popolo	85,-
8.04 CD: Kantoj de l' popolo	170,-

9. Odznaky

9.01 Esperantská hvězdička v bílém kruhovém poli, ø 7 mm	5,-
9.02 Esperantská hvězdička v bílé kruhové výseči, pod ní v oblouku nápis ESPERANTO, 10x17 mm	5,-
9.03 Odznak esperantistů-zdravotníků	5,-
9.04 Odznak Českého esperantského svazu	10,-

0. Pohlednice a ostatní zboží

0.01 Pohlednice "Saluton el Praha"	2,-
0.02 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha"	2,-
0.03 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha", aktualizovaný text 1996	3,-

Leden 2000

ESPERANTO - Jeden jazyk pro celý svět

Tak se jmenuje nový prospekt, který zpracovali Ludvík Chytil a Jiřina Vondráková z Přerova. Výtvarně je profesionálně zpracován, na křídovém papíře, barevný, natfíkrát složený na velikost cca 10x21 cm. Autoři v něm podávají odpovědi na několik otázek, vždy výrazně označených: *Co je esperanto? Kdo je jeho autorem? Na jakých základech je esperanto založeno? Jaké přednosti má využívání esperanta? Jak se naučit esperantu? Co vám umožní znalost esperanta? Mají esperantisté svou organizaci? Stručný přehled z historie esperanta. Vycházejí v esperantu tiskoviny? Vysílají v esperantu rozhlasové stanice? Internet a radioamatéři? Na závěr uvádějí výroky o esperantu od A. Einsteina, R. F. Kennedyho a R. Rollanda. Na zadní straně je místo pro razítko místní organizace. Informace žádejte u EK Přerov.*

Korespondi deziras

* Grupo de mez- kaj alt-lernejaj studentoj, komencantoj, deziras korespondi tutmonde. La unuan leteron adresu al kursestro: Jaroslav Žák, U Střelnice 20, 746 01 Opava, Čehio.

* Grupo s-ro Valerij Malihin, P.K. 24847, Krasnojarsk, 660133, Siberio, Rusio, retadreso: sapphire@ns.kgtu.runnet.ru, treege atendas leterojn de geesperantistoj de diversa aĝo. Jus pli rapide ili ricevos leterojn, des pli bone: Viktorija Schischkina (13j), Andrej Sisojev (13j), Anastasia Pravkina (14j), Galina Kononova (13j), Saida Novosjolova (13j), Anna Beljaeva (16j), Maria Bormotina (13j), Lena Dunina (13j), Diana Maksimovič (14j). Iliaj hobiaj estas modo, legado, muziko, vojaĝoj, komputilaj ludoj, kolektado de bildkartoj, kalendaretoj, moneroj kaj filmaktoroj.

Informoj pri la 85-a UK en Telavivo

Pro la fakto de forpaso (kaj antaŭa malbona sanstato) de mia edzino Stanjo, UK-perantino, prokrastigis la informoj pri la UK. Mi petas pardonon. Alikaze, CO de UEA komprenas la situacion kaj ĉiuj loĝantoj de ĈR, kiuj aliĝos post ĉi tiu sciigo kaj pagos la kongreskotizon pere de KAVA-PECH (provizora UKperanto por Ĉeĥio) ĝis la fino de februaro rajtos pagi, kvazaŭ la pago okazus antaŭ la 31-a de decembro 1999 (kotiztabelon rigardu en Starto 4/1999).

La 85-a UK en Telavivo okazos 2000-07-25/08-01 en luksa kvinstela hotelo kun kongresa centro Dan Panorama. Nepre necesas atentigi pri la fakto, ke dum la periodo de kongreso la meza temperaturo en ombro estas 30-32 °C kun alta humideco (65%).

Ofertoj por la partopreno de UK:

1. Oferto de KAVA-PECH (9-taga karavano - pli kosta, tamen pli luksa):

Flugo per EL AL (Izraela flugkompanio): El Prago-Ruzyň 24.7. linio LY524, forflugo 02.10, alflugo al la izraela internacia flughaveno Ben Gurion 06.45, reen 1.8., per LY521, forflugo de Ben Gurion 19.00, alflugo al Prago 21.55.

Loĝado en tristela klimatizita hotelo Moos, 5 minutoj buse aŭ 15 minutoj piede de la kongresejo. En sekvaj prezoj inkluzivaj: flugbiletoj inkluzive flughavenaj taksoj, transporto el la flughaveno al la hotelo kaj reen, loĝado dum la tuta restado en la hotelo Moos, abundaj matenmanĝoj, por Ĉeĥoj ankaŭ asekuro kontraŭ akcidento inkluzive kurackostojn kaj kostojn de necesa

restado en malsanulejo. En la grupo estos kuracistino bone parolanta la anglan pro eventuala neceso de la unua helpo kaj komuniko kun lokaj kuracistoj. La prezo NE inkluzivas: kongreskotizon kaj servojn krom la menciitaj. Prezoj: kun loĝado en en dulita ĉambro Kč 29400,-, en unulita ĉambro: Kč 38900.-

La loĝado en la hotelo Moos estas per UEA, do partopreni rajtas nur personoj, kiuj aliĝos al la UK (do havos pagitan la kongreskotizon). La neuzitajn lokojn en la hotelo Moos mi devas malmendi ĝis la 15-a de marto, tial validos nur la aliĝiloj, kies antaŭpago atingos la konton de KAVA-PECH plej malfrue ĝis la 10-a de marto 2000.

Pli proksimajn informojn kaj aliĝilon vi ricevos post ajna interessigno sendita al la adreso: KAVA-PECH, P. Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobřichovice. Tel.: 02/9912201, Fakso:02/991 2126, rete: chrdle@kava-pech.cz.

2. Tre favorpreza oferto de Okcident-slovakia Esperanta Societo (OSSES), KS Tallin, klub Esperanto, Stávbarška 60, 82107 Bratislava, tel. +421/7/45243316, esperant@isternet.sk. Prizorgas Pavol Kaščák, Vážska 21, 821 07 Bratislava.

Forflugo de Bratislava la 24-an de julio 2000 je la 8.50 h kaj rea alflugo la 3-an de aŭgusto je la 17.40 h. Flugbileto 12000.-SKK plus 900,- SKK por flughavenaj servoj (normale la flugbileto kostas 15400.-SKK, sed al E-grupo oni promesis rabaton). Loĝado en hotelo OLD JAFFA (dulitaj ĉambroj, WC kaj banĉambro komunaj) por 10 noktoj kostas 150,- USD (en normalaj hoteloj kun enĉambraj banejoj kaj necesejo 400,- ĝis 5000,- USD!). Aliĝiloj ĝis la 15-a de februaro (poste necesas telefone demandi).

KALENDARO 2000

aprilo-decembro Vystava Esperantem k mezinárodnímu dorozumění ve Státním okresním archívu Znojmo, Divišovo nám. 5, návštěvní dny: pondělí a středa.

2.-4.6. IRDEN 2000 en Plavy

11-15 jun. 22-a Sanmarineca Universitata Seso (SUS-22) en Hradec Králové. Infor: Joana Lewoc, Karl-Schwarzchild-Weg 6/319, 37077 Göttingen, Germanio

2.7.-12.8. 48-a SET Lančov

24.7-3.8 UK Tel-Aviv

10-13 nov. Kolokvo pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, temo: ekonomio. Kava-Pech, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice

IRDEN en PLAVY, ĈEĤA RESPUBLIKO 2.6.-4.6.2000

Tranoktado okazos en turista tranoktejo apud la haltejo Plavy (fervoja linio 036 Liberec-Tanvald-Železný Brod). Alveno de la partoprenantoj vendrede dum la tuta tago. Posttagmeze ebla ekskurso al monto Špičák apud Tanvald. Sabate laŭ vetero ekskurso al Boskov-grotoj. Dimanĉe ebla antaŭtagmeza promeno tra la valo de la rivero Kamenie.

Partoprenkostoj kaj kosto de tranoktado estas por unu persono kaj unu nokto cent kronoj. Limdato de aliĝo estos ĝis fino de aprilo. Bonvolu aliĝi al Max Hillebrand, Budovatelů 18, Jablonec nad Nisou, 466 01.

48-a Somera Esperanto-Tendaro en Lancov

2.7. - 15.7.2000 unua etapo

16.7.-29.7.2000 dua etapo

30.7.-12.8.2000 tria etapo

Kursoj A por komencantoj, B por progresintoj, C konversacia (nivele de Paŝoj al

plena posedo, La tuta Esperanto k.s.)

Antaŭtagmeze deviga instruado, posttagmeze banado, ekskursado, sportado, vespere tendarfajroj, diskotekoj k.s.

Kvin manĝoj tage, loĝado en 5-litaj kabanjoj. Ekskurso al Vieno. En la tendaro oni instruas ankaŭ angle kaj germane, okazas ankaŭ kursoj de Reiki. Pliajn Informojn kaj aliĝilojn petu ĉe:

*Klubo de Esperanto kaj mondaj lingvoj
CZ-674 01 Trebic
Ĉeĥa Respubliko*

Kristnaska donaceto por esperantistoj en Prostějov

Antaŭ Kristnasko decidis Urba Konsilantaro de la urbo Prostějov, ke unu el novaj stratoj en la kvartalo Čechovice ricevos nomon laŭ la internacia lingvo, do "Esperantská" (Esperanta). Tiel finfine sukcesis plurjaraj klopodoj de lokaj esperantistoj. Jen plua nova ZEO!

Nikolaj Starodubcev

ILUSTRITA VORTARO PRI HERALDIKO

La aŭtoro de la 345-paĝa libro korespondadis kun nia karmemora Jaroslav Klement (1935-1986), aŭtoro de ĉeĥa-Esperanta heraldika terminaro. La vortaro de Starodubcev prezentas 1005 terminojn en sep lingvoj (rusa, ukraina, angla, Esperanto, franca, germana, latina) kun indeksoj por la ses lingvoj. La kovrilo kolora, firma, kun plasta kovraĵo. Por mendantoj el Ĉeĥio 12 USD (inkluzive de poŝtaj elspezoj) per internacia poŝtmandato en nia nacia valuto. (Nikolaj N. Starodubcev, ul. N. Ostrovskogo 12-16, UA-340120 Doneck, Ukrainio).

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
Internet: cea @ tnet. cz
www.kuk.cz/cea/
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (31. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (31-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1